12 MARTO 1907. Unu Numero : 10 CENTIMOJ TRIA JARO. — Nº 3

★ ESPERANTO ★

DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ADMINISTRATION
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Suisse)

Abonnement annuel . . . . 3 francs
Un numéro . . . . 10 cent.

On s'abonne à l'Administration ou auprès des agents locaux

PUBLISHING OFFICE
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Geneva (Switzerland)

Yearly subscription . . . . 2s. 6p.
Separate copies 1d

Subscriptions payable to the Publishers or the Local Agents

ADMINISTRATION
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genf (Schweiz)

Preis pro Jahr . . . . Mk 2.50
Einzelne Nummern . . . . Mk 0.10

Abonnements Preise sind zu bezahlen durch die Administration oder die Abgeordneten derselben

Quelques services pratiques de l'Esperanto

Depuis la décision du Congrès de Genève sur les consulats esperantistes, il s'est formé de ces utiles organisations dans un grand nombre de villes de tous pays. Le but des consulats esperantistes est de fournir des renseignements d'ordre pratique aux esperantistes, soit par écrit, soit oralement (commerce, industrie, finance, hôtels, curiosités à visiter, etc...). On voit par là que dès que les consulats fonctionneront d'une manière régulière et internationale, tout esperantiste sera à même de recevoir sur tout espèce de sujet les informations dont il peut avoir besoin, soit pour ses occupations professionnelles, soit au cours de voyage. Il est à noter que dans quelques villes, il existe déjà un consul spécial pour les affaires commerciales. En outre, dans un très grand nombre de villes, il s'est fondé un service connu sous le nom d'Esperanto-Office, le plus souvent réuni avec le consulat. Les Esperanto-Offices s'adressent surtout au public non-esperantiste. Grâce à eux, les personnes qui ne savent pas l'Esperanto peuvent néanmoins l'utiliser pour leurs affaires. Les Esperanto-Offices conviennent admirablement pour aider les commerçants à faire connaitre au loin leurs établissements et leurs produits, sans avoir besoin de recourir à de multiples traductions. Ainsi un hôtelier, ne connaissant pas l'Esperanto et désirant faire rédiger ses prospectus dans cette langue, n'aura qu'à s'adresser à l'Esperanto-Office de sa ville, qui non seulement en fera la traduction en Esperanto, mais se chargera en outre d'envoyer un exemplaire de ces prospectus à chacun des Esperanto-Offices du monde entier. Les Esperanto-Offices ont promis d'autre part de communiquer ces réclames aux esperantistes de leur localité, de les traduire aux non-esperantistes qui en feront la demande, etc. Un certain nombre de ces intermédiaires disposent d'un local ou d'un magasin, situé dans une rue très fréquentée de la ville, et dans la vitrine duquel on peut lire toutes les informations susceptibles de servir au public. Dans certains Esperanto-Offices ou consulats, il est délivré à toutes les personnes qui le désirent une petite feuille, sur laquelle le voyageur trouvera les premiers renseignements dont il peut avoir besoin, notamment la liste des personnes de différentes professions auxquelles il pourra s'adresser pour obtenir des renseignements plus détaillés. Tous ces services (sauf les frais de timbre-poste) sont gratuits. Nous engageons donc très vivement le public, tant esperantiste que non-esperantiste, à se servir des consulats et Esperanto-Offices, qui constituent un exemple bien vivant des services pratiques que rend actuellement l'Esperanto.

Esperanto-Journal.

Rappelons qu'ESPERANTO est l'organe des consulats et Esperanto-Offices, dont il publie régulièrement la liste. (Voir Nos 2 et 3).

Einige praktische Vorteile des Esperanto

Seit dem Beschlusse des Genfer kongresses betreffend die Esperanto Consulate hat sich eine grosse Anzahl dieser nützlichen Einrichtungen in verschiedenen Städten aller Länder etablirt.

Der Zweck dieser Esperanto-Konsulate besteht darin, den Esperantisten praktische Auskunfte zu erteilen sowohl schriftlich als mundlich über Handel, Industrie, Finanzinstitute, Sehenswürdigkeiten u.s.w. Sobald als diese Konsulate regelmässig in allen Ländern funktioniren werden, ist jeder Esperantist in der Lage, sich selbst Auskunfte zu verschaffen über alles, was ihm in seinem Beruf oder für die Reise notwendig erscheint.

Bereits jetzt schon bestehen in einigen Städten besondere Konsulate für Handels auskunfte. Ausserdem wurde in zahlreichen Städten ein Auskunftsdienst eingerichtet unter dem Namen « Esperanto-Offices », welche in den meisten Fällen mit dem Konsulat vereinigt sind.

Die « Esperanto-Offices » dienen vorzugsweise dem Verkehr mit dem Publikum, welches dem Esperanto fernsteht und welches dadurch in die angenehme Lage kommt, gleichfalls aus den bestehenden Esperanto-Einrichtungen Nutzen zu ziehen für seine Interessen.

Dem Kaufmann wird dadurch die einzig dastehende Gelegenheit geboten sein Geschäft und seine Produkte weithin bekannt zu machen, ohne zu zahlreichen Uebersetzungen seine Zuflucht nehmen zu müssen.

Ein Hotelbesitzer z. B., welcher das Esperanto nicht kennt und gerne seine Prospekte in dieser Sprache abgefasst zu sehen wünscht, braucht sich nur an die « Esperanto-Office » zu wenden, welche nicht nur die Uebersetzung besorgt sondern auch ein Exemplar an jede in der ganzen Welt bestehende « Esperanto-Office » versendet. Des weiteren haben sich die « Esperanto-Offices » verpflichtet, die ihnen zugehenden Prospekte, etc. den Esperantisten ihres Ortes zugehen zu lassen und den nicht esperantistischen Interessenten zu übersetzen und zugänglich zu machen.

Eine Anzahl dieser Mittelsleute besitzen ein eigenes Lokal oder einen Laden in der meist frequentirten Strasse des Ortes, in deren Fenstern die das grosse Publikum interessierenden Auskünfte zu lesen sind. Auf verlangen wird jedermann ein Blatt ausgehändigt, auf dem er die wichtigsten Auskünfte für eine Reise verzeichnet findet, hauptsächlich aber eine Liste verschiedener Personen, an die er sich behufs genauerer Auskünfte wenden kann.

Der ganze Dienst mit Ausnahme der Briefkosten ist umsonst.

Wir bitten hiermit das esperantistische und nicht esperantistische Publikum auf das eindringlichste, sich dieser Esperanto Konsulate und Esperanto-Offices zu bedienen, welche ein lebendiges Zeugniss dafür ablegen, dass das Esperanto wirklich praktische Dienste zu leisten im Stande ist.

Esperanto-Journal.

Wir bringen in Erinnerung, dass « Esperanto » das offizielle Organ der Konsulate und « Esperanto Offices » ist, in dem regelmässig die Liste der vorgenannten veröffentlicht wird. (Siehe Nº 2 und 3).

Practical Use of Esperanto

Since the decision of the Geneva Congress to that effect, consulates have been formed in a large number of towns in many lands. The aim of an Esperanto consul is to furnish practical information to Esperantists, verbally or by letter (business, financial, hotels, curiosities worth visiting, etc...). Thus, as soon as these consulates are in working order everywhere, esperantists will be in a position to receive information on any required subject, whether for professional needs or when on a journey. It is noteworthy that at in certain towns a special business consul already exists. Moreover, in very many towns a service known as an Esperanto Office which is generally combined with the consulate exists. Esperanto Offices are specially intended for non-Esperantists. By their means people who do not know the tongue can nevertheless use it for their business transactions. Esperanto Offices give opportune help to merchants who desire publicity for their business, without having recourse to numerous translations. Thus a hotel keeper, unacquainted with Esperanto, and wishing to publish his prospectus in this tongue, need only apply to the Esperanto Office of his town, and the latter wilf undertake to translate and forward a copy of his prospectus to every Esperanto Office in the world. These Esperanto Offices on their part are bound to communicate the said prospectus to the esperantists of their several localities, and to translate them to non-esperantists who may desire this etc. Many of our consuls possess an office or shop in a central part of the town, and in their shop windows may be seen by the public all information needful. In certain Esperanto Offices or consulates, a sheet containing all necessary information is distributed on demand. This paper contains the list of persons of various professions who are willing to give more detailed information. All these service are gratuitous (except postage stamps). We warmly counsel both the esperantist and non-esperantist public to freely use the said consulates and offices, which constitute an excellent example of practical services actually rendered by Esperanto.

Esperanto-Journal.

Please note that the *Esperanto* is the organ of all consulates and Esperanto Offices, and regularly publishes a list of the same. See Nos 2 and 3).

Alcuni servigi pratici dell' Esperanto

Dopo la decisione presa al Congresso di Ginevra, sui consulati esperantisti, si sono costituite, in molte città di tutti gli Stati, di queste utili organizzazioni. Lo scopo dei consulati esperantisti è di fornire delle informazioni di ordine pratico agli esperantisti, sia per iscritto che oralmente (commercio, industrie, finanza, alberghi, curiosità da visitare, ecc...). Si vede da ciò che quando i consolati funzioneranno in modo regolare e internazionale, qualunque esperantista potrà facilmente ricevere su qualunque soggetto tutte le informazioni di cui può avere bisogno, sia per la proprie occupazioni professionali, sia in corso di viaggio. Si noti che in alcuni luoghi esiste già un console speciale per gli affari commerciali. Inoltre in molte città è stato fondato un servizio col nome di « Esperanto-Office », che sovvente è riunito al consolato. Gli Esperanto-Offices si occupano specialmente del pubblico non-esperantista, percui le persone che non sanno l'esperanto possono utilizzarlo per i loro affari. Gli Esperanto Offices servono per aiutare i commercianti a far conoscere in tutti i paesi del mondo i loro stabilimenti e i loro prodotti, senza far eseguire traduzioni numerose nelle varie lingue. Cosi un albergatore che non conosce l'Esperanto e desidera far redigere i suoi prospetti in questa lingua, non avrà che ad indirizzarsi all'Esperanto-Office della sua città, che non solamente gli farà la traduzione in Esperanto, ma si incaricherà inoltre di inviare un esemplare di questi prospetti a ciascuno degli Esperanto-Office del mondo intero. Gli Esperanto-Office hanno pure promesso di communicare queste « réclame » agli esperantisti delle loro località, di tradurle ai non-esperantisti che ne faranno la domanda, ecc. Un certo numero di questi intermediarii dispongono d'un locale situato in una via molto frequentata della città, e nelle vetrine di tali botteghe si possono leggere tutte le informazioni suscettibili di servire al pubblico. In alcuni Esperanto-Office, o consolati, viene distribuito, a tutte le persone che lo desiderano, un folio sul quale il viaggiatore trova le prime informazioni di cui può avere bisogno, specialmente la lista delle persone delle diverse professioni alle quali potrà rivolgersi per ottenere degli schiarimenti più completi. Tutti questi servigi (salvo le spese per i francobolli) sono gratuiti. Noi invitiamo dunque vivissimamente il pubblico, tanto esperantista che non esperantista, a servirsi dei consolati e degli Esperanto-Office, che costituiscono una prova evidente dei servigi pratici che rende già attualmente l'Esperanto.

Esperanto-Journal.

Facciamo osservare che l'*Esperanto-Journal* è l'organo dei consolati e degli Esperanto-Offices, dei quali pubblica regolarmente la lista (Vedi Ni 2e 3).

12 MARTO 1907. Unu Numero : 10 CENTIMOJ TRIA JARO. — Nº 3

★ ESPERANTO ★

DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ABONO

Unu Jaro . . . . 3 fr. $2\frac{1}{2}$ m. $2\frac{1}{2}$ š.
Helpabono . . . . 10 fr. 8 m. 8 š.

Oni abonas ĉe la Administracio
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève
aŭ ĉe la lokaj agentoj.

DIREKTORO :
HECTOR HODLER
8, Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)

Bulgara Eldono : N. B. Kovaĉef, Sofio

REKLAMO

1 paĝo . . . Fr. 240.— ‖ 1/4 kolono . . . Fr. 16.—
1 kolono . . . » 60.— ‖ 1/8 » . . . » 9.—
1/2 » . . . » 30.— ‖ 1/16 » . . . » 5.—

25 % por 12 anoncoj ; 50 % por 24 anoncoj.

Ĝenerala Agento : G. Warnier, 46, Rue Sainte-Anne, Paris, 2e.

Ni uzu Esperanton.

La nomo Esperanto estas nuntempe sufiĉe konata ; sennombraj broŝuroj, gazetartikoloj, ĉiaspecaj propagandiloj, paroladoj, kursoj, kongresoj, ĝin disfamigis tra la tuta mondo ; kaj multaj homoj estis interesataj kaj venis al ĝi, cetere pro kaŭzoj malsamaj. Sed ĉu oni povas diri, ke la praktika utileco de Esperanto kreskis proporcie kun ĝia disvastiĝeco ? Neduba estas la respondo. Se oni flanklasas kelkajn izolajn specialajn faktojn, kiuj ĉefe apartenas al fako intelekta, Esperanto estis ĝis nun ne tre utila — aŭ pli bone ĝi ne estis sufiĉe utiligata. Rilate al ni, staras ankoraŭ skeptikete la publiko, kiu demandas nin pri estantajoj, pri jamaj rezultatoj, kaj ne bone komprenas nuran entuziasmon. Tion demandas la publiko : ĉu enironte fremdan urbon, mi trovos hotelon, kaj magazenon kun kies oficisto mi povos paroli Esperante, aŭ ĉu sendonte esperante skribitan leteron al iu fremdlingva komercisto, ĝi estos komprenata kaj esperante respondata ; ĉu Fsperanto utilas al vojaĝantoj, ĉu oni povas per ĝi ricevi ian veran utilon ? Tiujn ĉi demandojn ni devas respondi elmontrante faktojn, kaj ne kontentigante nin per profetado pri la estonteco aŭ per vortoj ekskluzive idealaj. Fondi grupon, ellabori regularon, organizi kursojn, kunveni iafoje en agrabla « rondo esperantista », disjeti semojn per larĝa gesto, tio ja estas io bela kaj necesa siatempe, sed tute ne sufiĉa. Al kio servas la organizo de sukcesa kurso, se ĉe la finiĝo de tiu kurso, multaj forlasas la aferon, ne tial ke ili ne aprobas ĝin, sed nur tial ke la afero ne prosperas ilin konservi kaj allogi per sia utileco. Oni tute ne povas postuli de ĉiuj homoj la saman entuziasmon, per kiu estis provizitaj la unuaj batalantoj ; ju pli la movado antaŭeniĝas, despli oni devas sin turni al la praktikemeco de la homoj. Sekve, ni propagandu Esperanton malpli per vortoj, kaj pli per faktoj, ni provu, ni penu ĝin uzi, kaj tiel ni baldaŭ plu ne bezonos ĝin propagandi, sed la publiko mem venos al ni.

Grava paŝo estis farita de la dua kongreso ; oni kuraĝigis la praktikanuzon de Esperanto per la kreado de la konsuloj ; la specialfakaj asocioj montris novan direkton de nia movado, sed por ke tiuj kreajoj ne estu io teoria, estas necese ke la publiko por kiu ili estas difinitaj ilin uzu. En tiu ĉi jurnalo mem, estis jam ofte montritaj la servoj, kiujn povas fari tiuj organizajoj, kiuj, kiel la konsuloj, Esp.-oficoj, celas la tujan uzatecon de Esperanto. Tamen, ŝajnas, tro malmultaj komprenis la gravecon de aferoj, kiuj povas ŝajni unuavide malgrandaj kaj tamen estas multe pli efikaj ol tre elokventaj paroladoj, kiuj elvokas nur paseman interesiĝon. Se en ĉiu urbo estas serioze organizita ia konsulejo aŭ oficejo, se de ĝi la fremdulo povas akurate ricevi la petitajn sciigojn, se la vojaĝanto trovas ĉe sia alveno la necesajn informojn, tio ĉi jam estas ia grava rezultato, kiu, ĉar similaj faktoj estas facile diskonigitaj, favore impresos la publikon. Kelkaj el tiuj dezirajoj jam estas bone plenumitaj. Io plia estas farinda. La publiko esperantista uzu la servojn de la konsuloj kaj oficoj ; se ne, tiuj ĉi, kvankam plej bone organizitaj, pereos pro senlaboreco. La esperantistoj, ĝis nun ne sufiĉe uzis la lingvon, nek kuraĝigis tiujn, kiuj ĝin ekuzas. Estas esperantista devo provi la komercajojn de esperantista firmo[1]), peti sciigojn de la konsulejoj, kiam necese, konigi iliajn servojn, instigi ĉiujn, ke ili profitu tiajn perilojn.

Por ĉiuj ĉi realigindajoj, io estas nepre necesa : internacia agado. En ĉiu fako, nia penado estu internacie farata. Multaj interesaj entreprenoj jam ekzistas, sed pro ne internacia konateco, estas ne uzataj kaj ne uzeblaj. Gazeto aŭ grupo, ekzemple, prave laboras por enkonduki Esperanton en ian fakon, sed ĉar ilia agado estas nur loka aŭ nacia, sekve ne imitata aliloke, la afero malprosperas. Ni do pli kaj pli internacie uzu Esperanton ; al tio ĉi ni dediĉu niajn klopodojn, nian atenton. Tiam, kaj nur tiam, Esperanto estos io forta, vere vivanta kaj neŝancelebla, ĉar ĝi havos sian radikon en la bezono mem de siaj uzantoj, kaj ne nur en ilia entuziasmo kaj fervoro, kiuj estas ecoj forflugemaj kaj tro rapide mortemaj.

H. HODLER.

[1]) Vidu pri tio artikolon de S-ro Montrosier, Tra la Mondo, februaro 1907.

TRA LA MONDO

Sud-Ameriko.

La Plata, februaro 1907.

Tra la senlimaj kampoj, la fervojo sin etendas rekte, kaj la vagonaro trakuras ĝin longajn horojn senhalte, je la regula kaj forta spirado de la ferai pulmoj de la lokomotivo (kial mi ne havas tiajn !). Malmultaj arboj, en la unua tago de la vojaĝo. Nur ĉirkaŭ la « estancia » de iu riĉa brutedukisto staras kelkaj eŭkaliptoj aŭ paradizarboj ne altaj. Laŭ la riveretoj, densaj salikajoj plenaj je birdoj, sed en la kampo, nenio preter la maro de herbo verdaĉa, kie paŝas la mirindaj bovoj kaj la sennombraj ŝafaroj grizaj, kiuj sin movas kiel ondaro. Tie ĉi aŭ tie, stranga kreskajo ŝajnas kiel palmeto tripieda, sed baldaŭ vidiĝas struto, kiu levas la senplumen kapon kaj forkuras batante l'aeron per siaj mallongaj ridindaj flugiloj. Tiu struto ne estas la konata afrika struto, sed malriĉa kuzo konata sub la nomo *njandu*, kies plumoj utilas pli bone por balailetoj ol por ĉapeloj. Iu kuraĝa eksperimentulo provis alklimatigi tie ĉi la afrikan struton, kaj sukcesis havi pli ol 2.000 individuojn ĉefe virseksajn, kiuj, kiel oni scias, liveras la plej belajn plumojn. Sed dum unu militado, la kavalerio tratanĉis la ferfadenojn de l'alambrado, kiu ĉirkaŭbaris la kampon, kaj ĉio forkuris, ruinigante la mastron.

La tuta kampo estas dividita je kvadratoj per kilometrolongaj bariloj de fadeno ŝtala ordigita po ses, sep ĝis ok rangoj. Kiu kalkulos la tutan sumon de tiu ferajo ! Ekster kelkaj « stratoj » kiel oni nomas ambicie teoriajn irejojn ne ĉiam ireblajn, ne ekzistaj veraj vojoj. La vojaĝanto sin gvidas rigardante de malproksime la pordetojn de la bariloj, kaj se, okaze, li trovas, ke la ĉirkaŭturno estas tro granda, ĉiu kavaliro aŭ vetuilro havas specialan pinĉotranĉilon por malfermi al si la vojojn. La riverojn oni trairas, kiel oni povas. Sur la pli grandaj, estas pramoj, kiuj transportas la pasantojn, la ĉevalojn kaj la veturilojn, laŭ forta ŝtala ŝnurego streĉata tra la akvajo. La fervojo, tamen, interniĝas ĉiam pli kuraĝe en la kontinenton, kaj jam oni parolas pri la « Trans-Amerika » fervojo, de Panama al Buenos-Ayres. La ministro de Nord-Ameriko, S-ro Elihu de Root, ĝin aludis tre klare, en sia lasta vojaĝo, kaj tiu komuna espero estos eble realigita antaŭ la fama « Cape to Cairo » angloafrika.

En Durazno, halto. Oni nomas tie ĉi *durazno* la persikon komunan. La hispana vorto *melocoton* estas hebrea por la gaŭĉo ĉi-tiea. Mi ne scias, ĉu la urbo, ĉu la frukto estas la rajta posedanto de la nomo, sed la tuta ĉirkaŭajo estas plenega de tiuj arboj. Plenega ankaŭ la stacidomo, kiel skatolo de sardeloj. Oni atendas la generalon provincestron, *heroon* de la lasta militado. Orkestro de negroj esperas malpacience sian estron por ludi ian « marŝon ». Malgraŭ tiu minaco, mi devas ankaŭ resti tie ĝis la alveno de la interesa buĉisto, ĉar grupo de fraŭlinoj kaj sampartianoj lin atendas kaj ŝtopas la elirejon. Tuta la bando estas senmezure ornamita ruĝe, la koloro de la partio venkinta. Eĉ la fraŭlinoj metis multe, multe tro da rizblanko sur la vangoj, la kolo kaj la brakoj, ruĝegajn rubandojn sur la tuta persono. Fine, jen la granda homo. Dum la orkestro tondras, mi lin observas. Nigra, preskaŭ negra, kun kapo frizita, kovregita de orajoj, li prezentas la konatan figuron de la « haitia generalo ». Tie ĉi, kvankam la plej nombro de la popolo estas blanka, preskaŭ ĉiuj militistoj kaj policanoj estas nigruloj : lasta restajo de la malestimo, kiun oni longan tempon, havis al ili. La orita negrulo supreniras en sia kaleŝo, ruĝa ĝis la vipilo, ĝis la kondukiloj. La lakeoj havas okulojn kaj ĉemizojn ruĝajn. La fraŭlinoj svingas ruĝajn tuketojn : mi kredas diveni, ke ili bedaŭras ne esti ruĝhaŭtulinoj !

Ĝi la nerevido ! homoj, kiuj memorigas la fratomortigan batalon en tiuj paca, ĉi-ĉaj kampoj. La ideoj iras tiel rapide, ke jam la infanoj vin rigardas ne komprenante, dum via ruĝa kavalkado malaperas en la ora pulvo kaj la ardantaj flamoj ruĝaj de l'sunsubiro.

* * *

En Trinidad, unu sinjoro venas al mi, min rigardas, kaj prenante min per la ŝultroj, diras al mi rekte en la vizaĝo : « unu ! du ! tri ! kvar ! kvin ! ses ! sep ! ok ! naŭ ! dek ! Li scias nenion pli da Esperanto, sed li ricevis uuu ĉefeĉ'an ŝlosilon kaj li estas plena de entuziasmo. Mi klarigas al li mian mision : li estos certa apogo, antaŭen ! Mi renkontas unu tian kelkafoje ! »

De nun, mi devas vojaĝi sen fervojo, tra la kampo. Post du tagoj, ni alvenas al la domo de persono favora al la lingvo, sed kiu, kiel tiom da aliaj, post kelkaj lecionoj ĉion forlasis ! Cetere, li havas nenian konfidon al la sukceso de la lingvo kaj sin montras skeptikega. Nu ! dum tiom da *fervoraj* samideanoj sin kontentigas per paroloj kaj neeblaj projektoj de propagando, S-ro Behreno estas tiu, kiu donis al ni la eblon fari tiun vojaĝon, kaj dank'al li estos baldaŭ eldonataj novaj lernolibroj hispanaj. Se nia propagando donas ĉi-tie fruktojn, tio estos ŝuldata al li precipe.

Post kelkaj tagoj pasigitaj en la trankvileco de la kamparo, ni devas foriri okcidenten. En kelkaj lokoj, la akrido, unu el la sep vundoj de Egiptujo, kovras la teron, kiel stranga movanta tapiŝo. Kie ĝi pasis, restas nek unu folio al la arboj, nek unu peceto da herbo sur la tero nigra, kvazaŭ bruligita. Feliĉe, dank'al la metoda detruado, ĝi ĉiam pli maloftiĝas, kaj oni povas esperi ĝian malaperon.

Mercedes estas ĉiutage kreskanta urbeto sur la bordo de l'Rio Negro. En tiu punkto, la rivero larĝas de 600 ĝis 1200 metroj. La arboj de la bordoj kaj de la insuloj estas plenegaj je verdaj papagetoj kies babilado senĉesa kaj konfuza daŭras la tutan tagon. Multaj ŝipoj, kaj grandaj vaporŝipoj iras laŭ la rivero portante komercajojn de aŭ al la urbo. La haveno de tiu ĉi prezentas grandan agadon. Senĉese barkoj alportas de la internajo kaj de la rivero Takuarembo tritikon, majzon, lignon, ledon kaj lanon. Kaj kiam oni pensas, ke la grandegaj landoj trafluataj de tiuj riveregoj estas ĝis nun preskaŭ senhomaj, malgraŭ ilia riĉeco, oni antaŭvidas la tempon, kiam tiu punkto estos haveno pli grava ol Bordeaux aŭ Amsterdam. Granda vaporŝipo nin kondukos de tie ĝis la rivero Urugvaj', kie ni atendos la kurierŝipon de la alta lando ; ĉe la vespero, post ŝipirado inter la insuloj de l'Rio Negro, ni alvenas al Uruvaj'. Se la unua estas riverego, oni apenaŭ vidas la bordojn, Argentino ĉe l'okcidento, orientala, ĉe l'oriento. Kiam ĝi tro ŝvelas, ĝi estas furioza ondaro, kiu forprenas tutajn arbarojn kaj ilin kuntrenas flose kun iliaj serpentoj, de la boao ĝis la trogonocefalo, kaj eĉ malsataj tigroj, kiuj miaŭas pro surprizo kaj kolero. Kun siaj fratoj Paragvaj kaj kaj Parana, ĝi estas la plej grava liveranto de la Muzeo Zoologia en Buenos-Ayres. Tiu rivero estas mistero, kiun nur la geologio povos klarigi : ĝia nuna direkto kontraŭdiras energie la naturon de ĝiaj bordoj. En Montevideo, ĉe la kunmariĝo, ni trovas terajojn pratavolajn : gnejsojn acidajn kun malgravaj trafluoj de siliko aŭ bazalto. Poste, retroirante la fluon de l'rivero, granito blanka kaj granito rozkolora (kiel la egipta) el kiuj estas konstruataj la belaj domoj de la urboj Platriveraj. Jen felspato rozkolora kristaligita en larĝaj pecoj kun malmulte da siliko, sen glimo. Poste la samo, sed pli malgrandpeca, pli aŭ malpli acida, sed ĉiam tre nete praepoka. Ne unu tavoleto de alia terajo inter la granitajoj kaj la lastaj aluvioj, videble neantikvaj, de la rivero. Iom pli alte, oni trovas mason de kungluajo, kie oni retrovas la elementojn de la ŝtonegoj supreditaj, sed miksataj senorde, per pecoj diversgrandaj, kelkaj rondrulitaj. Tio estas evidente dejetajoj de torentoj fluintaj de sudo norden. Baldaŭ la ĥemia agado komencas. La silikatoj kalkoalumenaj perdas siajn bazojn, kiujn ni retrovos multe pli alte, la kalko post Salto, kaj la alumino en la argiloj de Paragvajlando ! La silico koaguliĝas en formo de : unue oniksoj koloriĝitaj kaj per masoj rondoformaj, ofte kun interfluajoj metalaj ; due, masoj grandegaj (mi vidis unu da pli ol cent metroj) da silico tre pura, blanka, kiu sin etendas tra la tuta provinco Mercedes ; trie, inter la kalkajoj de Salto, bulajoj de la sama, sed izolitaj, tre ofte kavaj. Ankaŭ tie oni trovas diverskolorajn kvarcojn kaj ekmontriĝas kristaligitaj alumenoj. Aperas ĉirkaŭ Mercedes, la unuaj tavoloj de alia epoko ol « primaria », en formo de ruĝa sabloŝtono tirola. Sed oni scias, ke la epoko de tiu sabloŝtono estas ofte duba. Nenia ostigita restajo en tiu parto. La unuaj proboscidianaj ostoj troviĝis ĉe la piedo de la montoj Brazilaj, kiuj estas antikvegaj. Tio ĉi postulas hipotezon. Mi ĝin faras tre hazarde, ĉar tiuj regionoj estas pli prilaborataj ol studataj. Laŭ la geologiistoj, la tavoloj, kiujn poste sublevis Andoj dum ilia stariĝo, sin etendis en golfo mallarĝa fermita al sudo, kaj al la okcidento per kontinento nun malaperinta. Supozeble, la montoj Brazilaj, kiuj ankoraŭ nun bordas la oceanon, sin longiĝis per altaj ĉenoj tra la nunaj landoj kaj, anstataŭ la nuna buŝo de la Plata, sin levis antaŭe pintoj de gnejsoj kaj granitoj praepokaj. Tiam, la riveroj fluis laŭ mala direkto : sude norden, kaj ĉio observita klariĝas. La centro de Sud-Ameriko estis ĉu maro, ĉu lagego, kies bordoj orientaj restas ankoraŭ parte, sed kies okcidentaj tute malaperis. Je la momento de altiĝado de la Anda ĉenego, la « montoj de la Plata » subiĝis kaj la tuta torento de la amerikaj akvoj, tenitaj oriente per la brazilaj restajoj, okcidente

per la novaj montoj, defluegis suden tra la pordo malfermata, gravurante en la fundo de la antaŭa maro tiujn grandajn sulkojn, kies larĝeco mirigas la observanton, Paragvajo kaj Urugvajo.

Tiel sin amuzas la homo, farante hipotezojn sur la ferdeko de ŝipo...

Paul BERTHELOT.

***

Hispanujo

La propagando de Esperanto tre prosperas en la nuna tempo : la granda sukceso de la du internaciaj kongresoj de Esperanto havis grandan influon ĉi-tie ; la Madridaj jurnaloj komencis favore paroli pri nia lingvo kaj la kreado de kursoj kaj grupoj plioftiĝas de tago al tago. Se oni povas diri, ke Murcio estis la naskurbo por Esperanto, ankaŭ oni povas certigi, ke en la nuna tempo, Valencio altiris al si la plej viglan movadon esperantistan. En tiu urbo oni projektas la kreon de eldona societo por enpreso de verkoj esperantaj, kiuj enhavos tekstojn originalajn aŭ tradukojn de la ĉefaj nuntempaj literaturajoj hispanaj. Esperanto faras ankaŭ gravajn progresojn en aliaj urboj, ekz. Barcelono, Bilbao, h.c., speciale en la nordokcidenta regiono, kie S-ro Monteagudo kaj aliaj fervoruloj sukcese propagagandas.

***

En politiko, la ĉefa okazintajo estis la ĉeso de la liberala regado kaj la komenco de nova epoko. La liberaluloj regadis dum 1 ½ jaroj kaj lasis en projekto siajn famajn leĝojn pri regulado de asocia rajto, forigo de la nutraja regnimposto, kaj starigo de la deviga servado militista. La unua projekto elvekis grandan eksciton, ĉar ĝi koncernis religian aferon, nun tiel gravan kaj urĝan en Francujo. La konservativuloj regadas nun Hispanujon de la fino de januaro, sub prezido de S-ro Antono Maura, kaj baldaŭ okazos la balotoj por la nova deputataro.

***

Multaj verkoj en la lasta tempo pliriĉigis la hispanan teatron. La plejmulto estis nur unuaktaj, apartenantaj al la de ni nomita « malgranda speco ». Inter la verkoj, kiuj plejbone sukcesis, oni povas citi la komedion « La gaja karaktero », kunverkitan de S-roj Alvarez Quintero, du junaj fratoj, kiuj entuziasmigas la publikon en ĉiuj siaj amuzaj teatrajoj. La saman nokton de la unuafoja prezentado de « La gaja karaktero » en la hispana teatro, la admirantoj de la aŭtoroj entreprenis la aranĝon de la festeno por festi la sukceson de le nova verko. Tiu festeno okazis la 5an da februaro en la sidejo de la ĉefjurnalo ABC kaj estis vera solenajo ; ĉeestis la plej eminentaj viroj, inter kiuj la prezidanto de la ministraro S-ro Maura, la juna ministro S-ro Cierva, bofilo de nia senlaca propagandisto S-ro Codorniu, la deputata parlamentestro S-ro Canalejas, multaj aliaj talentuloj kaj, atentu legantoj! amaso da plej belaj kaj ĉarmaj virinoj. La festo estis rava kaj post la toastoj la festitoj S-ro Alvarez Quintero dankis la ĉeĉeestantojn legante belegan al ili dediĉitan versajon, kiun mi ne tradukas, ĉar mia poeta kapablo estas preskaŭ nula.

Kaj fine, la plej rimarkinda lasttempa novajo en Hispanujo estis la *malvarmeco*, ĉar la termometro bonvolis montri sian malaltecon kaj signi kelkajn aŭ multajn gradojn sub nulo !

Esp. 5597.

Tutmonda Kroniko

Februaro 13. Romo. — Mortas princino Kristino Bonaparte, vidvino de princo Napoleono Karolo.

14. Priceston (U. S. A.). — S-ro Carnegie donacas 150 milionojn al la universitato.

15 Parizo. — S-ino Sara Bernhard estas elektita profesorino de deklamarto ĉe pariza konservatorio.

16. Bolonjo. — Mortas la poeto Giosuè Carducci, je la aĝo de 72 jaroj.

Vieno. — Mortas princino Klementino, patrino de princo de Bulgarujo.

17. Italujo. — Kontraŭklerika manifestado en diversaj urboj pro la 307 a datreveno de la turmento de Giordano Bruno.

Nov-Jorko. — Ektuŝego en la ĉirkaŭurba fervojo ; 25 mortintoj, 76 vunditoj.

19. Parizo. — Sukcesa parolado de ministro Briand ĉe la franca deputataro pri la deŝtatiĝo de la eklezio.

Berlino. — Malfermo de la nova Rejĥstago ; imperiestra parolado.

Vaŝingtono. — La ĉambro de la riprezentantoj aprobas leĝon pri elmigrado.

20. Parizo. — Mortas la klera ĥemiisto Moissan, elpensinto de la elektra forno.

Rumanujo. — Mortas S-ro Lahovary, eksministro de la eksterlandaj aferoj.

21. Holandujo. — Apud la riverenirejo de Meŭzo, pereas la vaporŝipo « Berlin » pro ventego ; 150 dronintoj.

22. Danujo (Jutlando). — Pereas norvega velŝipo ; 18 dronintoj.

Pretoria (Sud-Afriko). — Sekve de la balotoj, generalo Botha formas la ministraron.

La Kaneo (Kreto). — La vaporŝipo « Imperatrix » surteriĝas ; 40 mortintoj.

24. Centr-Ameriko. — La respubliko Hondurasa ekmilitas kontraŭ la respubliko Nikaragva.

25. Venecio. — Datreveno de la dua centjaro post la naskiĝo de la komediverkisto Goldoni. Festoj en ĉiuj italaj urboj. Inaŭguracio de busto en Parizo kaj de ekspozicio en Venecio.

26. Parizo. — La filantropo Osiris testamentis 30 milionojn por la Pasteur'a instituto.

Centr-Ameriko. — G-lo Zelaya, prezidanto de Nikaragvo, venkas batale G-lon Bonilla, prezidanto de Honduraso.

Berlino. — Politikaj deklaracioj de la diversaj partiestroj ĉe la germana Rejĥstago. Parolado de kanceliero Bulov.

A. TELLINI.

INFORMOJ

Statistiko

Unuiĝitaj ŝtatoj. — La linioj de la fervojoj havas suman longon da 350.000 kilometroj kaj uzas pli ol 1.382.196 laboristojn. Ilia tuta valoro superas 10 miliardojn. Laŭ statistiko de s-ro Warne Batting, la nombro de la mortintoj dum la jaro 1906, sekve de la fervojaj malfeliĉoj, atingis 9.703 ; oni kalkulas 86.008 vunditojn. Dum la sama periodo, la nombro de la vagonaraj renkontiĝoj kaj dereliĝoj atingas 13.113, t. e. unu ĉiunaŭdekminute. Mortis 3.718 laboristoj (t. e. po 1 inter 28) kaj 492 vojaĝantoj (1 inter 738 milionoj). Oni de tio vidas, ke la proporcio de la mortintoj estas tre alta.

Vortriĉeco. — Inter la eŭropaj lingvoj, skribas La Revue, la angla estas la plej vortriĉa. La *Standard Dictionnary* enhavas 350.000 vortojn. El ĉiuj anglaj verkistoj, Shakespeare-la pretendita malklerulo-uzas 16.000 vortojn. Milton uzas nur 8.000. Oni notu, ke anglo de meza instruado uzas ĉirkaŭe 3 aŭ 4 milojn da vortoj. Per milo da vortoj, oni povas tre bone sin komprenigi en Granda Britujo. A. T.

Teatro

Leitmeritz. — *La Mizeruloj*, dramo de la viena verkisto Karl Marfeld Neumann, dramaturgo, kaj la geaktoroj estis aplaŭditaj post ĉiu akto, ĉefe la dua. Oni preparas la tradukon en Esperanto, kaj estas certe, ke la verko almilitos la teatrojn.

W. H.

Italujo-Bonan sukceson havis la dramo de la jurnalisto V. Movello, titolita *La ŝiparo de la elmigrantoj* ; ĝi entenas la historion de parlamenta kaj ama intrigo, kies protagonisto estas deputato kun tre malpura konscienco. Bone sukcesis la dramo de Traversi, nome *Edzino honesta.* La du geedzoj amas sin reciproke tro flame. La jaluzo kaj neŭrastenio de la edzo pligrandiĝas la korpan amon, ĝis li, freneza kaj deliranta, estas kondukita en malsanulejon. Venecio, kie la granda komediverkisto Coldoni naskiĝis en 1707, festis solene lian datrevenon. Li mortis malriĉa en Parizo la 6an de februaro 1793. La plej bela memorajo estis la eldono de lia verkaro, kiu konsistas en 20 volumoj kaj kostis 50.000 fr.

La Keats Shelley Association aĉetis la domon, kie loĝis la du anglaj poetoj Keats kaj Shelley por fari en ĝi muzeon, kaj bibliotekon. La domo estas en Romo, ĉe la preĝejo Trinita dei Monti. A. T.

ESPERANTO PRAKTIKA

ESPERANTO-KONSULOJ

(*Dua nomaro*)

Aŭstrujo

Leitmeritz. — Esp. Of. : S-ro W. Heller.

Praha. — Konsulój : S-roj Josef Barvir, Praha II-1518 ; Jos. Novak, II-Zemska Banka ; Vacl. Riegl. II.-Moran 19.

Reichenberg. — Konsulo, Esp. Of. : S-ro Richter.

Wien. — Esp. Of. : S-ro Romanovitch, Zentagasse 1.

Belgujo

Andenne. — S-ro Melin, 24, Grand'-Rue.

Antverpeno. — S-ro Champy, 21, rue d'Herentals ; S-ro Leclerc, avenue de l'Industrie, 11.

Bruges. — S-ro Leken, 59, rue des Bouchers.

Bruxelles. — S-ro Blanjean, 83, rue du Collège.

Duffel. — S-ro Ed. Van Uytven.

Huy. — S-ro Wilmet, 43, rue du Marché.

Liège. — S-ro Sloutzky, rue de Nysten, 74.

Malines. — S-ro Van Peteghem, rue Notre-Dame.

Namur. — S-ro Verbeken, 21, rue du Collège.

Spa. — S-ro Grosjean.

Verviers. — S-ro H. Palmer, 20, place Verte.

Brazilujo

Rio-de-Janeiro. — S-ro Backenher, Largo de S. Francisko.

S-ro R. Kantao (por Komerco), rua dos Purives, 107.

Britujo

Bradford. — S-ro Tuke Priestman, 12 Exchange Building.

Chester. — S-ino A. H. Perry, 29 Cherry Road.

Dover. — S-ro J. M. Fivez, 25 Pencester Road.

Edinburgh. — S-ro Al Easson, S. S. C. 50 Queen street.

Folkestone. — S-ro A. P. Southa Scorncleff Road.

Glascow. — S-ro D. Buchanan, 7 Garthland st. city.

Goole. — S-ro Parker, 58 Pasture Rd.

Greenock. — Esp. Of. : S-ro Miller, 15 Charles St.

FELIETONO DE "ESPERANTO" 3

La £ 1.000.000. Banka Bileto

el Mark TWAIN

(trad. P. A. H. MUSCHAMP)

Ĉu mi povas aĉeti ? Ne, mi nenion havas en la mondo esceptante milionon da livroj. Tiel mi devigate preterpasis. Sed baldaŭ mi reiris. Min terure persekutis la tentado. Mi pasis kaj repasis antaŭ tiu butiko almenaŭ ses fojojn dum tia vira batalado. Fine, mi ne baraktis plu ; devigate mi kapitulaciis. Enirinte, mi demandis, ĉu oni havas fuŝitan veston, kiu estis forjetita. La viraĉo, al kiu mi parolis, signodonis kape al dua viraĉo, sed ne donis respondon ; li alproksimiĝis la montritan viraĉon, kaj tiu ĉi, sen paroloj, signodonis al tria viraĉo. Lin mi alproksimiĝis kaj li elparolis :

« Servos vin baldaŭ ».

Mi atendis ĝis li elfinis kion li faris ; tiam li kondukis min en ĉambreton, kaj, trarigardante amason da fuŝitaj vestajoj, elektis por mi la plej malindan. Mi surmetis ĝin ; ĝi estis tro larĝa kaj neniel ĉarmega, sed ĝi estis nova, kaj mi maltrankvile deziregis ĝin ; do mi ne parolis pri ĝiaj malbonajoj kaj difektajoj, sed mi diris malkonfideme :

« Se vi povus atendi la monon kelkajn tagojn, estus al mi tre oportune. Mi en la poŝo ne havas malgrandajn monerojn ».

La viraĉo artefaris tre sarkasman grimacon ; tiam li diris :

« Ho, kial ne ? Nu, nature, tiom mi ne esperis. Kredeble, tiaj sinjoroj kunportas nur grandajn monerojn ».

Ekkolerante mi diris : « Mia kara, vi ne devas ĉiam juĝi pri nekonatulo, laŭ la vesto, kiun li havas. Mi tute povas pagi ĉitiun veston ; mi nur ne deziris doni al vi la enuon ŝanĝi grandan bileton. »

Tiam li aliĝis iomete sian konduton, kaj diris, kvankam ankoraŭ malŝateme :

« Mi ne parolis malbonintence, sed ĉar vi riproĉas min, mi respondas, ke vi tute ne rajtas konkludi, ke ni ne povas ŝanĝi ian bileton, kiun vi okaze havas en la poŝo. Tute kontraŭe, ni *povas*. »

Mi tuj donis al li la bileton, dirante : « Ho, tre bone, mi petas pardonon. » Li ricevis ĝin kun rideto, unu el tiuj larĝaj ridgrimacoj, kiu tute ĉirkaŭiradas, kiu enhavas faldojn, kaj sulkojn, kaj helikformajojn, kiu similas lokon en lageto, kien oni jus jetis brikon ; tiam en la momento kiam li ekrigardetis la bileton, tiu ridgrimaco glaciiĝis, flaviĝis, kaj tiel similis tiujn ondajn, vermajn, tordajn lafajojn, kiuj troviĝas malmoliĝataj sur la ebenajetoj de la deklivo de Vezuvio. Neniam antaŭ tiu momento, mi vidis rideton tiamaniere kaptitan kaj daŭrigitan. Tie staris la viro, senmove tenante la bileton, kiam la butikestro rapide proksimiĝis por klarigi la aferon. Li vigle diris : « Nu, kio estas ? kio okazas ? kio mankas ? » Mi diris : « Nenio okazas. Mi atendas ŝanĝmonon. »

« Nu, nu, donu la ŝanĝmonon, Tod, dodu la ŝanĝmonon. »

Tod respondis : « Donu ŝanĝmonon ! Facile dirata, sinjoro ; vi rigardu la bileton. » La butikestro ekrigardetis, mallaŭte, elokvente fajfis, tiam subite subenkliniĝis al la amaso de rifuzita vestajaro, kaj ĝin ekdisiĝis tien kaj tien ĉi, dum li babilis ekscitege, kvazaŭ al si mem : « Vendi al stranga milionulo tian malmontrindan vestajon ! Tod estas malspritulo — natura malspritulo — naskiĝis tiel, ĉiam faras ion tiamaniere, forpelas ĉiun milionulon el la magazeno, ĉar li ne povas distingi milionulon de vagisto, kaj neniam povis. Ha, jen, tion mi serĉis. Bonvolu senvestigi vin je tiuj aferoj, kaj forjetu ilin en la fajron. Bonvolu surmeti tiun ĉemizon kaj tiun veston ; jen, bona afero kaj ĝuste alfarita — senornama, riĉa, modesta kaj duke modema ; farita laŭ la mendo de fremda princo — eble, vi konas lin, sinjoro, lia Glora Moŝto, la Hospodar de Halifaks ; devigate, li lasis ĝin ĉi-tie kaj prenis funebran veston, ĉar lia patrino, estis mortonta — cetere ŝi ne mortis. Jen malgrava afero ; mi ne povas havi ĉion kiel ni ; — tio estas, kiel ili. Jen ! fasono bonega, mirinde konvenas al vi, sinjoro : nur la veŝto ; aha, ree bone ! nun la jako — dio mia ! nu rigardu tiun ! Perfekta — la tuta afero ! Neniam dum mia tuta spertado, mi vidis tian triumfon. »

Mi esprimis mian kontentecon.

« Bone, sinjoro, bone ; estas bona jamfaritajo, tion mi povas certigi. Sed atendu ĝis vi vidos kion mi faros por vi laŭ via propra mezuro. Nu, Tod, libron kaj plumon ; komencu, krura longeco, 32" - k.t.p. Antaŭ ol mi povis eldiri unu parolon, li jam mezuris min, kaj poste mendis frakojn, jaketojn, ĉemizojn kaj ĉiuspecajn aferojn. Kiam fine mi trovis okazon por paroli, mi diris :

« Sed, mia kara sinjoro, mi ne povas akcepti ĉi-tiujn mendojn, nur se vi povos atendi senlime aŭ ŝanĝi la bankbileton. »

« Senlime ! Tio estas malforta vorto, sinjoro, malforta. Eterne — jen la vorto, sinjoro. Tod, elrapidigu tiujn aferojn, kaj sendu ilin laŭ la adreso de tiu sinjoro kaj.... »

« Mi jus translogas. Preterpasante, mi sciigos al vi la novan adreson. »

« Tre bone, sinjoro, tre bone. Momenton — mi havos la honoron elkonduki vian Moŝton. Jen bonan tagon, sinjoro, bonan tagon. »

Nu, vi komprenas, okazis tio, kio devis okazi. Nature, mi komencis aĉetadi kion ajn mi bezonis, poste mi petis ŝanĝmonon. Post semajno, mi estis luksege provizita je ĉiuj necesaj komfortajoj kaj luksajoj, kaj ekloĝis en multekostan privatan hotelon en Hanovera Placo. Mi tie vespermanĝis, sed por la tagmanĝo, mi estis fidela al la humila restoraciejo de Harris, kie mi unue ricevis manĝon por mia milionlivra bankbileto. Mi ekfaris la riĉecon de Harris. La fakto disfamiĝis, ke la fremda strangulo, kiu portadis en la veŝtpoŝo milionlivrajn biletojn estas patrono de l'ejo. Tio sufiĉis. Antaŭe malriĉa, baraktanta, malsata, malgranda entrepreno, ĝi fariĝis fama kaj troŝarĝita de klientaro. Harris estis tiel dankema, ke li devigis min akcepti pruntojn, kaj ne volis, ke mi rifuzu ; kaj, tiamaniere, mi, senmonulo, havis monon por elspezi, kaj vivadis kiel la riĉuloj kaj famuloj. Mi juĝis, ke baldaŭ estos rompego, sed, jen, mi estis, kaj mi devis transnaĝi aŭ droni. Tiu elemento de minacanta malfeliĉego ĝuste donis gravan flankon, seriozan flankon, jes, tragedian flankon al la stato de miaj aferoj, kiu alie estus nur ridinda.

(*daŭronta.*)

Grimsby. — S-ro W. A. Shipway, 61 Legoby Avenue.

Harrogate. — S-ro R. H. Swainson, 47 Chapel st.

Hull. — S-roj A. H. Rishwrth, 59 Park Avenue ; C. Sackson, 48 Kingskench st. ; F. W. Coulson, 14 Adderbury grove ; A. E. Hepton, 40 Derringham-st.

(*daŭronta.*)

ESPERANTISTAJ HOTELOJ

Ni regule enpresos la nomojn de la esperantistaj hoteloj. Ni montros :

1e Per litero H tiujn, ĉe kiuj estas persono, kiu povas paroli Esperanto.

2e Per litero K tiujn, ĉe kiuj estas persono, kiu povas korespondi per Esperanto.

3e Per litero R tiujn, ĉe kiuj esp. revuoj estas legeblaj.

Jen la unua listo :

Algerujo. — Grand hotel de l'Oasis, boulevard de la République, Alger, P K R.

Aŭstrujo (Tirolo) — Hotel Eppauerhof, Eppan, apud Botzen, P K R.

Belgujo. — Taverne du Cirque, Place Leopold, Namur, K.

Bohemujo. — Reichenberg, hotelo Reichshof, P. K.

Francujo. — Parizo, 30, rue de Vaugirard, hotelo du Borysthène, P K ; hotel Marigny, 11, rue de l'Arcade (VIIIe), K. — Boulogne-sur-Mer (Pas-de-Calais), hotelo Castiglione, P K ; Rues Wissocq et Beltene, restaurant hotel, P K. — Saint-Amand-les-Eaux, hotelo de Paris et du Mont-Blanc, P K. — Tours (Indre-et-Loire), boulevard Heurteloup, hotelo de l'Univers, P K ; rue Nationale, hotelo de la Boule-d'Or, P K. — Aix-les-Bains (Savoie), Grand-Hôtel d'Aix, P K ; hotelo de l'Europe, P K ; hotelo de Paris, K ; hotelo Damesin-Continental, K. — Houlgate (Calvados), hotelo Café du chemin de fer, K. — Carentan (Manche), hotelo d'Angleterre, K. — Beaune (Côte-d'Or), hotelo de France, K. — Bellegarde (Ain), grand hôtel des Touristes et des Voyageurs, K. — Bourg (Ain), hotelo de la Paix et Terminus, K R. — Vesoul (Haute-Saône), bufedo de la stacidomo, P. — Troyes (Aube), hotelo Saint-Laurent. — St-Gingolph (Hte-Savoie), pension-hotel Fornay, K.

Germanujo. — Bad-Nauheim, apud Frankfurt-a-M. Pension-hôtel Sanssouci, P K R.

Svisujo, Frutigen (Bern), pension Speranza, P K ; Adelboden (Berna Oberlando), pension-hôtel Hagen, K. — Saint-Imier en Sonnenberg, hotelo de la Croix-Bleue, K.

Tiujn nomojn ni ĉerpis el la diversaj esp. gazetoj. Ni enpresos dufoje en jaro la tutan liston.

Ni treege insistas por ke la konsuloj, Esp-Oficoj, k. t. p. bonvolu konservi ĉi tiun presitan liston, kiu ebligos al ili facile liveri informojn al la petantoj. Sed ĉar ni deziras, ke ĉi tiu listo estu tute ĝusta kaj fidinda, ni nur enpresos en la definitiva listo la nomojn de hoteloj, kies mastro sciigos nin poŝtkarte aŭ letere, ke li plenumas la suprajn kondiĉojn. Aliparte, ni rememorigas, ke la punktoj 2 kaj 3 povas facile esti atingeblaj. Sufiĉas, ke la esp-oficoj proponu al la hoteloj de sia urbo, ke ili tradukos senpage la leterojn esperante skribitajn, kaj interŝanĝe ni presigos la nomojn de la hoteloj, kiuj akceptas signante ilin per la litero K. Tiu grava rezultato estos facile ricevebla, se la konsuloj aŭ esp-oficoj prenas sur sin la taskon viziti la hotelmastrojn de sia urbo kaj sciigi ilin pri tiu servo de la peresp. oficoj.

Rilate al la punkto 3a (revuo esp. legebla), ni faras rabaton da 33 % al ĉiuj hotelistoj, restoraciestroj, k. t. p., kiuj bonvolos aboni nian jurnalon por ĝin konstante elmeti en la legosalonoj. En tiu okazo, vizito estas la plej bona maniero por ricevi rezultaton favoran, kaj la fakto, ke esp. gazeto estas legebla en legosalonoj de la hoteloj aŭ kafejoj estas tre utila por la propagando. Estas senutile montri kiel necesa estas energia agado ĉe la hotelistojn ; dank' al la ĉiujaraj kongresoj de Esperanto, la vojaĝantoj esperantistaj fariĝas ĉiam pli multaj ; estas do dezirinde, ke en ĉiu urbo estu hotelo, en kiu estas persono, kiu povas, se ne paroli, almenaŭ korespondi per Esperanto.

KONSULAJ INFORMOJ

Por respondi diversajn demandintojn, ni ĉi-sube klarigas la servojn, kiujn ni faras al la Esp. konsuloj kaj Oficoj, kiuj pagas monhelpan abonon da 10 fr. al ESPERANTO. 1e Ni presigas senpage iliajn adresojn ĉiunumere. 2e Ni presigas iliajn sciigojn (informojn pri ilia kreo, organizo, la servoj speciale faritaj de ili k. t. p.). 3e Ni presigas la anoncojn de la personoj, kiuj petas la servojn de la Esp-Of. Ekzemple, se iu en Bourg deziras sendi siajn infanojn en anglan familion por ke ili pasigu tie sian libertempon, li povos sin turni al la Esp-Of. en Bourg, kiu sendos al ni anoncon presotan en ESPERANTO. Poste ĉiuj anglaj Oficoj leginte ĝin afiŝos tiun anoncon kaj ĝin tradukos anglen, tiamaniere ke ĝi estu konata de ĉiuj. Se iu deziras korespondi aŭ rilati kun ia fremdulo pri difinita temo, li bezonos nur sin turni al la konsulo aŭ Ofico de sia urbo. Se tiu konsulo estas monhelpanta abonanto de ESPERANTO, ni senpage presigos tiun anoncon, kiu, per la aliaj konsulejoj, estos konigata al ĉiuj intereseblulo] Estas tre dezirinde, ke ĉiuj Esp-Of. kaj konsuloj aliĝu kaj profitu tiujn favorajn kondiĉojn. Iom post iom, nia jurnalo fariĝos la komuna organo de tiuj entreprenoj, kiuj ĝis nun ne povis sin konigi kaj utili kiel dezirinde, nur pro tio, ke ilj ne havis ian komunan ligilon.

***

Bourg (Ain-Francujo). Oni deziras korespondi kun klera homo, loĝanta en San Francisko aŭ alia urbo de Kalifornio (Usono). La sekretario de la Esp-Of. estas preta por doni letere aŭ buŝe informojn pri turismo, somerrestado en Jura montaro kaj pri la mirinde konata preĝejo de Brou (sendas vidajojn de tiu preĝejo).

Chaux-de-Fonds (Svisujo). — Konsulo : S-ro Bourquin, r. Leopold Robert.

Bradford (Anglujo) — Esperantista Konsulo de la grupo . A. Tuke Priestman, 12 Exchange Buildings-Bradford.

Le Creusot (Francujo). — Konsulo, Esp-Ofico, Vendejo, biblioteko, k. t. p.

Dover (Anglujo). — Konsulo : J. M. Finey, Admiralty House. La No 1 de « ESPERANTO » donas interesajn opiniojn pri la funkciado de la Konsulejoj Esperantistaj. Al la preparado de definitiva regularo ni pensis de longe kaj hodiaŭ havas la plezuron esprimi la jenajn opiniojn : 1° La Konsulo devas havi publikan oficejon en kiu li povas ricevi vizitantojn. 2° Kiam vizitantoj esperantistaj venas ĉe lia konsulejo, la Konsulo ĝentile donos informojn pri la urbo, la hoteloj, la interesaj vidajoj, k. t. p. 3° Al ĉiuj demandoj pri komercaj aferoj entenante poŝtmarkojn por la respondo, la Konsulo devas respondi. 4° Estas dezirinde, ke Centra Konsula Oficejo decidu kion oni devas pagi por la sciigoj. 5° Interŝanĝo de poŝtmarkoj inter la Konsuloj estos necesa. 6° La Konsuloj devos kolekti la plej korektajn informojn pri komercistoj, komercajoj, k. t. p. 7° Privataj aŭ familiaj sciigoj neniam estos donataj, escepte pri naskiĝo, edziĝo, morto aŭ aferoj publikaj & oficialaj. 8 Estus dezirinde ke almenaŭ ĉiujare, ĉiu konsulo sendu al Centra Oficejo aŭ al Gazeto oficiala « ESPERANTO » ekzemple, raporton konsulan pri la industrioj, la komerca movado, k. t. p. ; de la urbo de lia loĝejo. Tiu-ĉi lasta regulo estos tre grava, ĉar ĝi montros al la popoloj de diversaj landoj la utilecon de la konsulejoj.

J. M. FINEY.

London. S. E. Hithergreen. Konsulo : J. W. Baxter, Longhurst road 4.

Roanne (Francujo). — Konsulo : S-ro Bousquet, liceo de Roanne.

Romo (Italujo). Esp-Konsulejo, Fotografia Dottarelli, 29 via Belsiana.

Roubaix (Francujo). Konsulo : A. Denis, 86, rue du Moulin-Roubaix.

Valence (Francujo). Konsulo : J. Delfour, kolegiestro.

Hegi-Winterthur (Svisujo). — Socia Informejo. Estis malfermita en Hegi-Winterthur ejo, de kiu oni povas ricevi ĉian dezirindan informon pri la sociaj movadoj. La ĉefa okupado estas kolekti kaj doni informojn pri laborista, virina, antialkohola, antimilitarista, socialista kaj liberecana movadoj. Por povi plenumi tiun taskon, ĉiu estas invitata kunhelpi, sendi novajojn aŭ postuli demandaron senpagan de mi. Ĝis nun 19 personoj en 11 landoj konsentis konstante helpadi. La utilo de tia informejo sendube estos tre granda kaj fariĝos tiom pli granda, ke ĝi estos pli forte subtenata. Gustav SCHWENGELER.

***

Chalon-sur-Saône. — S-ro Jadeau sciigas nin, ke fondiĝis en Chalon-sur-Saône Esp.-Oficejo, kiun la grupo loĝigis ĉe S-ino Blanchard, tabakvendistino, Bd de la République. « Tute en la centro de l'urbo, ĝi sidas, proksime al la poŝtoficejo kaj la granda kafejo, kie verda stelo allogos ĉiujn esperantistojn por legi, trinkante, esperantajn jurnalojn, aparte ESPERANTO, kiu diskonigas novajojn el ĉiuj landoj en la mondo. Plie, la titolo Esperanto-Oficejo, pentrita per grandaj literoj, atentigas la pasantojn al la legado de afiŝo, sur kiu estas skribitaj sciigoj pri la kursoj, jurnaloj, anoncoj, kiuj havas intereson por esperantistoj aŭ neesperantistoj. Jam estas ja grandega la sukceso de nia oficejo. Oni kutimas eniri por lui kaj aĉeti librojn kaj jurnalojn. Kesteto povos ankaŭ enricevi la salutojn el fremdaj amikoj rapide trapasantaj, kaj petojn el ĉiuj pri kaj per Esperanto. Kiel niaj geamikoj en Le Creusot, ni presigas cirkulerojn, kiujn disdonos la vendistino por sciigi pri la grupo, urbanoj, ĉiuj utiloj kaj vidindajoj en la urbo... »

***

Esperantista Konsulo. — S-ro Sam Meyer dissendis cirkuleron al ĉiuj esperantistaj konsuloj konataj de li. Tiuj, kiuj ĝin ne ricevis, bonvolu konigi sin. Sufiĉos se ili sendos vizitkarteton kun sia adreso al S-ro Sam Meyer, esper. konsulo en La Rochelle (Francujo).

AL NIAJ LEGANTOJ

Por plifaciligi la enkondukon de ESPERANTO en la hotelojn, kafejojn, publikajn legosalonojn, k. t. p., la jara abono al nia gazeto kostos nur 2 frankojn anstataŭ 3. Ni esperas, ke tio instigos niajn legantojn kaj agentojn klopodi por ke baldaŭ ESPERANTO troviĝu en multaj legejoj. Tio ĉi estas samtempe bonega propagando por nia lingvo.

Ni enpresos en la komenco de ĉiu sezono la nomaron de la hoteloj, kafejoj, k. t. p. ĉe kiuj ESPERANTO estas legebla.

***

Al niaj agentoj. — Ni petas la agentojn, kiuj ne jam sendis sian monatan kalkulon, ke ili bonvolu tion fari kiel eble plej baldaŭ, en la celo faciligi nian taskon. Por eviti senutilajn poŝtelspezojn, kiuj, se oni ne atentas, tute forigus la malmultan profiton, kiun ni ricevas de la ponumera vendado, ni tre petas niajn agentojn, ke, se letero ne estas nepre necesa, ili komuniku kun ni per poŝtkartoj. Aliparte, la monatan kalkulon, oni povas sendi kiel presajon.

***

Propagando de nia jurnalo. — Oni ofte demandas nin, kiel oni povas propagandi nian jurnalon. Jen estas kelkaj manieroj, pri kiuj la sperto montris al ni, ke ili estas bonaj :

1e. Postuli de ĉiuj vendistoj, ke ili elmetu nian jurnalon sur la jurnalkadrojn same kiel la naciajn gazetojn. Multaj personoj ofte forgesas aĉeti numeron, se ili ne vidas ĝin.

2e. Postuli de ĉiuj libristoj, vendistoj, k.t.p. ke ili vendu nian jurnalon, tiamaniere, ke la personoj, kiuj deziras ĝin aĉeti ne bezonu traserĉi en la tuta urbo. Ni deziras, ke, iom post iom, nia jurnalo estu trovebla en ĉiuj kioskoj kaj ĉiuj jurnalejoj de l'mondo ; tiu efektiviĝos rapide, se la legantoj nin subtenos regule aĉetante la jurnalon, kaj montrante al ni la lokojn, kie oni devus ĝin trovi.

3e. Diskonigi la jurnalon en la grupaj kunvenoj, vesperfestoj, paroladoj, k.t.p. Ekz. paroladonto povas mendi al ni ĝustatempe difinitan nombron da ekzempleroj kaj allasante la profiton al iu kriisto (30 %), la jurnalo estas vendebla ĉe la eniro al la paroladejo. La rezultato ĉiam estas bonega.

4e. Konsili al la lernantoj de la kursoj, ke ili aĉetu regule la jurnalon aŭ ĝin abonu. La fakto ke ili povos legi regule duonmonatan gazeton en esperanto konservos ilin al nia afero kaj instigos ilin al la ellernado de la lingvo.

5e. Igante la hotelmastrojn, restoraciestrojn, bibliotekistojn, aboni la jurnalon tiel ke ĝi estu legebla ĉe ĉiuj publikaj legosalonoj. Kiel ni klarigas pli supre, la prezo de nia abono estas tre malkara por tiu kategorio ; sekve, ĉiu esperantisto devas proponi al la hotelistoj, kafejestroj, k.t.p. ke ili abonu ESPERANTO.

Monata kroniko

Februaro 1907

En la plej multaj landoj remalfermiĝis la parlamentejoj, kaj malgraŭ la akreco de la sezono, la voĉo de la politikistoj en la parolejoj jam ne silentas... La reĝo de Anglujo, reveninte el Parizo de vizito, kiu momente distris la gazetistojn, laŭ la solena antikva kutimo, malfermis novan parlamentan kunsidon, sed tuj post tia festo, la viroj leĝdonantaj estis sieĝataj de la virinoj leĝdonontaj, kaj tio iel rompis la unutonecon de la diskutado, kvankam en si mem la fakto estas grava. Germanujo altiris la atenton de la mondo, certe multe pli ol ĉiuj landoj. La germana popolo liveris al la imperiestro Rejĥstagon laŭ lia deziro ; la liberaluloj kaj konservativuloj prosperis kontraŭstari al la momenta kunligo de la katolikoj kaj socialistoj. La signifo de la lastaj balotoj ne estas jam tre klara ; eĉ en la germana gazetaro kaj ĉe la senpartiaj rigardantoj, la opinioj estas tre malsamaj, kaj, cetere, ĉar la ciferoj de la voĉoj esprimitaj ne plene konformiĝas kum la nombro de la postenoj ricevitaj de ĉiu partio, senlima estas la diskutado. Kio ajn estas, la nova deputataro estis malfermita, kaj ĉe unu el la unuaj kunvenoj princo von Bulov denove laŭdis la politikon de la nova, « nacia », plimulto. Staras nun la demando, ĉu tiu nuna liberala-konservativa plimulto daŭros, aŭ ĉu la kanceliero devos ree ekrilati kun la centrumo, la hieraŭa malamiko. Laŭ lia lasta parolado, ŝajnas, ke tia rekonsento estas neebla almenaŭ nuntempe.

Tutan Rusujon plenigis la bruado de la balotoj ; la reala stato de la aferoj estas ne precize konebla. Reĝas konfuzeco kaj necerteco, tamen, el la ricevitaj rezultatoj, oni povas konstati, ke la Rusuja imperiestro ne havis tian ŝancon kiel Vilhelmo IIa. La estanta Dumo konsistas, en sia plej granda parto, el maldekstrumaj partioj ; se la « kadoj » ne okupas tiel multe da postenoj kiel en la antaŭa delegitaro, oni tamen ne povas diri, ke la nova Dumo estas en siaj elementoj malpli revoluciema ol la antaŭa, ĉar la laborista kaj socialistaj partioj estas en granda nombro. Denove do, Rusujo tuj altiros ĉies atenton ; ĉia antaŭdiro esta io malsaĝa, kiel jam montris la pasinto ; nur la atendemuloj estas pravaj.

Malgraŭ diversflankaj ekscitoj, la stato de la aferoj en Francujo ne estas tiel grava. La ministro Briand ricevis grandan sukceson ĉe la Parlamento refojigante siajn alvokojn al interkonsento kun Vatikano, sed praktike la afero ne estas aranĝata, kaj ŝajnas eĉ dube ke ĝi estas aranĝebla iel ajn. Cetere, malgraŭ tiu malklarajo, la franca popolo estas tute kvieta, kaj ĝian kortuŝiĝemon pli ekscitis ia lasta krimo ol la disadmonoj de la politikistoj. La nova proponata leĝo pri la laŭrenta imposto estas ankaŭ fervore diskutata ; ĉiu kalkulas por si mem, kaj el tiu... objektiveco, ekformiĝas la opinioj. La okazoj sekve de la deŝtatiĝo de la eklezio ŝajne pli tuŝas la eksterfrancajn popolojn. En Italujo, pro la datreveno de G. Bruno, oni en diversaj urboj procesiis, paroladis, alvokis, cetere trankvile.

En Aŭstrujo, oni sin pretigas por la estontaj balotoj, kiuj laŭ la nova leĝo, estos farataj per la universala voĉdonado, kaj, verŝajne, plene aliiĝos la ĝisnunajn partiojn. ; balotoj ankaŭ okazos baldaŭ en Hispanujo, sekve de la nova regado konservativa, sed, en rilato politika, tiu lando ne liveras kutime tre gravajn surprizojn ; Eĉ en Sud-Afriko, la politikaj bataladoj komencis : la Transvalanoj elektis, laŭ sia nova konstitucio, deputataron, kies plimulto estas holanda. Generalo Botha estas la estro de la ministraro.

Italujo perdis sian faman poeto, Carducci, kaj ĝi priploris lin, kiel ĝi sola priploras siajn idojn. La nomo de la poeto restos kara al ĉiuj homoj, kiuj komprenas, ke pli grava estas tia grandegulo, ol ĉiuj parlamentaj disputoj. Sed la bruon pri tiu morto silentigis rapide la gazetaj rakontoj pri la skandalaj krimoj kaj procesoj, kiuj ĉu en Francujo kaj Anglujo, ĉu en Unuiĝitaj Ŝtatoj, elvokas la publikan scivolémon, kaj plie liveras riĉan materialon al la kriminalogiistoj kaj psikologiistoj, se ne al la leĝistoj.

A. R.

POŜTKARTOJ

KUN LA PORTRETO DE D-ro ZAMENHOF

estas vendataj ĉe S-ro A. Thonney, konsulo esperantista, 10, Rte du Tunnel, Lausanne (Svisujo)

Prezo : 10 kartoj, Fr. — 80 ; 50 kartoj, Fr. 3.— ; 100 kartoj, Fr. 5.— ; 200 kartoj, Fr. 8.50

Ĉiu mendo superanta 100 kartojn estos sendata sen poŝtelspezoj. Per bona fotografajo, oni faras poŝtkartojn ; sin turni al S-ro Thonney.

ATENTU !

Kursanoj de Esperanta Kurso en Norda Politekniko, 180 Holloway Road, London N. (Anglujo) transsendas al samideanoj kiuj bonvolos sendi al ili ilustritan poŝtkarton vidajkarton de l'Kongresurbo **Kembridĝo**, kun sciigoj pri tiu urbo.

Nouvelle Revue Pratique de Droit International Privé

Monata revuo en franca lingvo

133, Boulevard Saint-Germain, Paris

Direktoro : HORN

Administranto : J. TREMEAU

Jarabono : Francujo 10 fr. — Poŝtunuiĝo 12 fr.

Unu numero : 1 franko

la Librairie de l'Esperanto

46, rue Ste-Anne — PARIS

Vendas ĉiujn verkojn novajn aŭ malnovajn pr Esperanto.

Sendo de katalogoj senpage.

Jus aperis :

ESPERANTO-MANUEL, cours pratique et complet en 15 leçons, par GABRIEL CHAVET et GEORGES WARNIER, 1 volume broché 1 franc.